

50/32 Idear Grot, Riga

Kembridga Kongreso 1907

SOFOKLEO

# Edipeo Reĝo

1<sup>a</sup> SCENO

El la greka teksto tradukis

**E. PRÉAUBERT**

Honora profesoro ĉe la Angers'a Liceo  
(Franclando)



PRESEJO GERMAIN ET GRASSIN

ANGERS (FRANCE)

701.635-B.Esp.

3

[15]

~~702584-A~~

701635-A

175



# EDIPEO REĜO

---

## ANTAŬPAROLO

Antaŭ kelkaj jaroj, mi profitis okazon aŭdi la faman, la famegan artiston francan Munet-Sully, ludantan la rolon de Edipeo en la tragedio greka « Edipeo Reĝo » de Sofokleo.

Oni scias, ke Munet-Sully promeniĝis triumphon sian tra la preskaŭ tuta mondo, kaj eĉ ludis grandsukcese en la loko mem, kie Sofokleo prezentis sian tragedion, en Grekujo mem. Kiel ĉiuj, mi aplaŭdis, aplaŭdadis la grandan artiston ; tamen, tamen, rememorante la grekan tekston kaj la ekzercojn de traduko, kiujn ni faris, ni infanoj, en niaj liceoj, mi bedaŭris pri du punktoj rilataj, ne, ja, al la arto tiel perfekta de Munet-Sully, sed al la traduko franca.

Unue, la franca versfarado ne simila estas al la greka versfarado de l'tragediaj aŭtoroj ; malpli fleksebla ĝi estas, malpli rapida, unuvorte malpli tragedia.

Due, tre ofte la tradukantoj, kaj aparte S<sup>ro</sup> Lacroix cetere tre lerta tradukanto franca, aldonis al la greka teksto diversajn stilajn ornamajojn, kiuj senutile longigas la frazon kaj difektas la tragedian movadon. Ĉar en pasiaj movadoj veraj, ne estas uzataj esprimoj luksaj, kaj akademiaj frazoj ; sed male la penso sin esprimas per vortoj malmultaj kaj simplaj. Kaj certe, pri tiu vidpunkto, Sofokleo superas siajn tradukantojn kaj imitantojn : pli simpla, pli natura, pli homa unuvorte li estas ol ili.

Jam de longe mi forgesis tiujn pripensadojn, kiam okazon mi renkontis lerni la lingvon Esperanto. Tiam multajn analogiojn mi trovis en ĝi kompare kun la greka lingvo, aparte en la versfarado ; kaj volante min ekzerci en la nova lingvo, mi ekpensis entrepreni la tradukon esperantan de la Sofoklea tragedio : « Edipeo Reĝo », sed kun respekto tiom ĝusta kiom eble de la frazo greka kaj de la ritmo. Tion farante, mi kredis utili ne nur al mi, sed samtempe al l'Esperantistaro ; ĉar tiel, ĉefverko ŝatata de ĉiuj epokoj povos esti legata de samideanoj de ĉiuj landoj.

Kiel provajon literaturan kaj ankaŭ arĥeologian kuriozaĵon, mi diros antaŭ vi la unuan scenon de la unua akto. Sed mi urĝe petas vin, ke vi bonvolu min indulgi. Ĉar, se la primitivajn tekstojn kaj ritmon pli proksime mi obeas, mi ne tamen estas Munet-Sully : pli preciza, eble ; malpli lerta, certe !



## PRISKRIBO DE LA SCENEJO

En antaŭa scenejo, granda placo de Tebo, urbo fondita iam de antikva reĝo Kadmuso ; dekstre, la reĝa palaco, ĉi tie kaj tie kelkaj altaroj, kie fumiĝas fajro por oferoj al la dioj. Ĉe la fundo oni vidas la riveron Ismenuson, kies borda tero uzata estis sub nomo de *Cindro de Ismenuso*, (Ismenuso, estinte duondio, aliformiĝis en riveron) por diveni, por antaŭdiri la okazontaĵojn. Trans a rivero estas aliaj placoj kun du temploj de Palaso. La nuna reĝo, Edipeo, estas elektita, tial ke li liberigis Tebon je monstro terura, Sfinkso, kantanto senkompata, kiu per kantoj altiris la vojaĝantojn, kaj ilin manĝis.

Nune abomena pesto turmentas Tebon kaj multajn Tebanojn dejetas ĉe Plutonon, ankoraŭ alnomatan « Ades ». Grandamase la popolo, tre diversaĝa (infanoj,

junuloj, maljunuloj, pastroj), sin turnas al la reĝa palaco tenante branĉetojn de olivarbo kaj rubandojn uzatajn en la preĝoj. Tiam eliras Edipeo el la palaco kaj alparolas al la popolo.

## UNUA AKTO

### UNUA SCENO

#### EDIPEO

Infanoj, de Kadmus' antikva novaj idoj,  
Do kial, kunvenante al mi, vi rapidas,  
Branĉetojn preĝajn kaj rubandojn kunportante?  
De mirhparfumo samatempe l'urb' pleniĝas,  
Sed ankaŭ same de ĝemadoj kaj mortkantoj.  
Volante tion per senditoj ne aliaj,  
Infanoj, aŭdi, mi mem tien ĉi aliris,  
Mi, kiun fama Edipeo ĉiuj nomas.  
Sed maljunulo, ekparolu ; ĉar por ili  
Konvenas ke vi diru kian staton vian :  
Ĉu ia timo, ĉu deziro ? Mi intencas  
Vin helpi tute. Ĉar mi estus malsentema,  
Kunvenon tian se neniel mi kompatus.

#### PASTRO

De mia lando, ho reganto, Edipeo,  
Vi vidas ke ni, diversaĝaj, kune sidas  
Altaroj apud viaj : tiuj ne ankoraŭ  
Kapablaj flugi longe ; tiuj ĉi peziĝaj  
Pro maljuneco, pastroj kiel mi, de Zeŭso  
Mi granda pastro ; tiuj ankaŭ elektitaj  
El nia junularo. La cetera gento,  
Kronata de rubandoj, sidas en la placoj,  
De l'Ismenuso sur la cindro antaŭdira.  
Ĉar, kiel vi mem vidas, ege jam la urbo  
Disflanken marruladas, kaj ellevi kapon

El fundo de sangruĝa maro ne plu povas :  
Mortanta pro senfruktaj floraj de la tero,  
Mortanta pro pereo de paŝtataj bovoj,  
Virinaj kaj abortoj. Ĉar flamporta dio  
Sur Tebon falis, Pesto la tre malamika,  
Kaj ĝin skuegas. Tial la Kadmusa domo  
Malplena iĝas, sed riĉiĝas nigra Ades  
Per ploroj kaj ĝemadoj. Ĉerte ni ne kredas  
Vin diojn egalanta, nek mi, nek ĉi tiuj  
Infanoj kunsidantaj ĉe fajrujoj viaj,  
Sed vin estimas el la viroj la unua,  
En la okazoj de la vivo, kaj kun dioj  
En la rilatoj ; vin mem, kiu en Kadmusan  
Veninta urbon, elĉesigis la depagon,  
Ni kiun donis al kantanto senkompata,  
La Sfinkso. Kaj pri tio vi neniel estis  
Aŭ direktita de ni, aŭ informigita.  
Sed per la helpo de la dioj, oni diras,  
Kaj oni kredas, ke vi savis nian vivon.  
Aukoraŭ nun, vin, Edipean tre potencan  
Genion, urĝe ni petegas ĉiuj tiuj,  
Ke kuracilon ian por ni vi ektrou,  
Aŭ voĉon dian vi aŭdinta, aŭ konsilon  
De iu viro ; ĉar plej ofte spertaj viroj  
Sukcesas post konsilo, kiel mi konstatas.  
Do iru, ho vi ! la plej bona de l'mortontoj ;  
Relevu nian urbon ! Iru, atentante  
Ke nun ĉi tiu lando vin savinto nomas  
Pro via sindonemo dum l'estinta tempo.  
Fariĝu ke neniam ni memoros ke,  
Unue starigita glore, rego via  
Defalis poste ! Sed prefere ĝis la stato  
Sendangereca vi relevu tiun urbon.  
Vi iam, sub favoraj aŭspicioj, donis  
Riĉecon al ni ; ne alia nun vi estu !  
Ĉar tiun landon se regonta estas vi

Ankoraŭ, kiel vi direktas ĝin hodiaŭ,  
Pli bone estas certe regi ĝin kun viroj  
Ol senenhavan ! Kaj, simile, envaloras  
Nenion fortikaĵo, aŭ nenion ŝipo,  
Iĝinta sen la viroj, ne plu ĝin loĝantaj.

EDIPEO

Infanoj kompatindaj, mi l'aferon konas,  
Tro konas, vi pri kiu venis konsiliĝi.  
Mi bone scias ke vi suferadas ĉiuj ;  
Neniu tamen, inter vi mem suferantaj,  
Ekzistas, kiu tiom kiom mi suferas.  
Ĉar vin doloro via trafas ĉiun solan,  
Kaj ne alian, sed animo mia male  
Je l'urbo, je vi, je mi samatempe ĝemas.  
Do vi ne vekas min pro dormo neageman ;  
Sed vi sciigu ke mi multajn verŝis larmojn,  
Kaj multajn vojojn provis mi, vagante  
Tra la eraroj de la penso. Fine solan  
Mi kuracilon trovis, grava per serĉado ;  
Kaj ĝin plenumis. Ĉar Kreonon mi deputis,  
De Menekeo filon, kaj bofraton mian,  
Al la Pitika domo de Febus-Apolon,  
Por ke li informigu kion devas mi  
Elfari aŭ eldiri, mi per kio savus  
Ĉi tiun urbon. Sed la daŭro kalkulata  
De l'tempo post eliro lia, maltrankvila  
Min igas, kion li do faras, pripensantan  
Ĉar pli ol decas li forestas, pli ol tempo  
Konvena. Sed, li kiam estos reveninta,  
Tre ege mi malbona estus, se ne farus  
Mi ĉion kion ordoninta estos dio !

PASTRO

Sed ĝustatempe vi parolas, ĉar al mi  
Kreonon alvenantan oni ĵus ekmontras

EDIPEO

Ho princo Apolono ! se savontan ŝancon  
Almenaŭ li alportus ! Kiel ŝajnas ke  
Anoncas en okuloj liaj ĝojo brila !

PASTRO

Kredeble li raportos favoreme, ĉar  
Alie, ne kronata estus lia kapo  
De multebranĉa laŭro tute fruktoporta.

EDIPEO

Ni baldaŭ tion scios ; ĉar sufiĉe estas  
Por aŭdi li proksima. Princo, frato mia,  
De Menekeo filo, kian de la dio  
Respondon al ni alportante vi revenas ?

KREONO

Ja bonan ! ĉar mi diras ke se malfacila  
Afero trafos celon, ĉio elsukcesos !

EDIPEO

Sed kion do signifas tiu ĉi parolo .  
Ĉar ne konfidon ĝi, almenaŭ, al mi donas,  
Se de nun timon ne inspiras je l'estonto

KREONO

Ĉu vi deziras, autaŭ ili, aŭdi min,  
Ĉu hejmen iri, por paroli mi pretiĝas

EDIPEO

Nu ! antaŭ ĉiuj diru. Car min tuŝas plu  
Dolor' de ili, ol de mia vivo zorgo.

# AĈETEBLAJ ĈE LA SAMA LIBREJO

GERMAIN ET GRASSIN, ANGERS

---

**Du Mirindaĵoj**, gvidlibro de la Monto Saint-Michel (Franclando), esperanta traduko, laŭ S<sup>ro</sup> Monmarché, de S<sup>ro</sup> GALARD, prezidanto de la Angers'a Esperantista Grupo.

---

## LES PROVERBES EN CINQ LANGUES

(Kvinlingra Proverbaro)

**English Proverbs**, par J. BONNET, professeur d'Anglais au Lycée d'Angers. — Prix : 0 fr. 50.

**Proverbes français**, par J. BONNET, professeur d'Anglais au Lycée d'Angers. — Prix : 0 fr. 50.

**Deutsche Sprichwörter**, par O. HESNARD, professeur d'Allemand au Lycée d'Angers. — Prix : 0 fr. 50.

**Refranes Castellanos**, par H. BARTHE, professeur d'Espagnol au Lycée d'Albi. — Prix : 0 fr. 50.

**Proverbes italiens** (*en préparation*).

---

## ANGERS ET L'ANJOU

*Notices historiques, scientifiques et économiques*

Un volume in-8° illustré de nombreuses gravures, de XII-744 pages. — Prix : 7 fr. 50.

---

SPÉCIALITÉ D'OUVRAGES, PLANS & CARTES

relatifs à l'Anjou

SPECIALAJ VERKOJ, PLANOJ KAJ KARTOJ

koncernantaj la Provincon de Anĵou